

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 102 (Ninth Year) Melbourne (Melbourne), Australio. 10 Januaro 1929

ALVOKO DE LA PREZIDANTO DE I.C.K. AL LA ESPERANTISTARO.

Karaj gesamideanoj,

Kiel Prezidanto de I.C.K. mi deziras hodiaŭ fari alvokon, ne sole al miaj samlandanoj, sed al ĉiuj samideanoj tutmondaj.

Jen mia peto: Ne okupu vin pri kritikaj plendoj kaj malgrandaj flankaferoj, sed, forjetante ĉiujn personajn ĉagrenojn, forgesante ĉiujn pensojn pri via propra gloro kaj honoro, laboru senĉese por la pli rapida efektivigo de la revo de nia kara majstro.

Al la eminentaj gvidantoj de niaj Naciaj Societoj mi simple diras: Iru antaŭen en harmonio kaj konkordo. Fermu la okulojn kontraŭ negravaj plendoj, evitu disputojn pri bagatelaj aferoj. Havu fidon kaj kuraĝon. La nokta mallumo pasis kaj la suno brilas super nia movado. Oni konstatis, ke vermo per persisteco kaj pacienco iam naĝis de Eŭropo ĝis Afriko. Per diligenteco kaj pacienco ni povos atingi la celon en gloro.

Al la redaktoroj de niaj gazetoj kaj revuoj mi permesas al mi proponi: Evitu en viaj ŝatataj paĝoj ĉiujn polemikojn kaj akrajn disputojn pri tute ne gravaj aferoj kaj senĉese disvastigu kuraĝigajn artikolojn kaj novaĵojn. Kaj pri alia multe pli grava afero mi fervore petas vian subtenadon. Mi estas nur komercisto... ne aŭtoritatulo pri lingvaj aferoj. Pro tio mi neniam misuzas la tempon pri demandoj, kiuj ne alportas

profiton al la movado. Mi propagandas la lingvon kaj lasas la diskuton pri lingvaj punktoj en la manoj de la Lingva Komitato. Mi esperas, ke ĉiuj redaktoroj kore kaj lojale subtenos niajn laŭstatute elektitajn aŭtoritatojn kaj dediĉos siajn grandajn kapablojn kaj energiojn al la pli grandigo de la movado. Dum almenaŭ unu aŭ du jaroj ni bezonas nepre pacon por povi labori. Se la Lingva Komitato aŭ alia institucio de nia movado ne agas laŭ niaj deziroj, ni ĉiam posedas la necesan povon anstataŭigi ĝin per aliaj homoj. Same pri niaj aliaj organizaĵoj. Sed ni nepre devas agi laŭ la principo, ke kiujn ajn ni elektas, tiujn ni devas lojale obei. Mi turnas min al vi hodiaŭ, estimataj redaktoroj, kun la espero, ke vi helpos min je la nuna momento, ĉar mi bone scias, ke vi posedas la povon krei kaj kreskadinovan spiriton de harmonio kaj amikeco en niaj rondoj tutmondaj. Ne sufiĉas, ke ni prediku pri frateco buŝe, se ni ne sentas amikecon kore.

Al la grupanoj mi deziras diri: Neniam forgesu, ke la fortoco de la movado vere troviĝas nek ĉe la I.C.K., nek ĉe la Naciaj Societoj, sed ĉe VI! Ĉar el viaj rondoj oni ĵetas la semojn per kiuj la tutmondo movado riĉiĝas, kiu alportas al ni ĉiam-kreskantan rikolton. Tial viaj klopodoj kaj vigla propaganda laborado estas nepre necesaj por la triumfo de nia sankta afero.

Mi havas la planan fidon pri la frua sukceso de esperanto kaj, kvankam

gis nun mi ne multe partoprenis la internacian vivon de la movado, mi esperas, ke helpite de la Generala Sekretario de I.C.K., sro Robert Kreuz, kun kiu mi jam kiel eble plej intime kunlaboras, mi rapide akiros la kapablecon plenumi miajn novajn devojn je la kontentigo de niaj estimataj kunkomitatanoj kaj de la tuta esperantistaro.

Kuraĝe antaŭen! karaj gesamideanoj. Mi vere kredas, ke en la spaco de eble dek jaroj, Esperanto estos ĝenerale akceptita kiel unu — se ne la sola — el la oficialaj lingvoj en ĉiuj internaciaj kongresoj. Sed tio okazos nur, se ni daŭrigas labori ŝultron apud ŝultro, manon en mano, ne serĉante personan honoron, sed batalante entuziasme kaj kuraĝe por la multe pli nobla celo de Tutmonda Frateco kaj Senĉesa Paco.

JOHN MERCHANT, Prezidanto de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado.

ESPERANTO AND WIRELESS.

At its sitting on 29th September, 1927, at Como the Council of the International Union of Radiophony unanimously adopted a new resolution in favour of Esperanto, of which the following is the principal passage:

"Whereas Esperanto constitutes a powerful means of intercomprehension and reconciliation between nations, the Council again invites the members of the Union to give the most serious attention to that language and particularly to retain the teaching of it in their programmes.

Referring to the resolution of the General Assembly of 12th May at Lausanne, the Council recommends members to apply to the International Central Esperanto Committee in Geneva — in relation with the Secretariat of the International Union of Radiophony — which has offered its services to stations for the purpose of indicating local Esperantist collaborators, and is also prepared to publish an international time table of broadcasting in Esperanto, with a view to facilitating the success of the undertaking."

—I.E.S.

Address subscriptions to Manager, "Suda Kruco," Box 731f, Elizabeth St. P.O., Melbourne.

KONGRESO ANTVERPENO.

Geneve, 10 Novembro 1928.

Tre estimataj samideanoj,

En la septembra numero de La Suda Kruco ni legis sub "Wellington" noton, ke en la Novzelanda gazetaro bedaŭrinde aperis eĉ ne unu noto pri la Antverpena kongreso kaj ke vi sciigas tion por kinsidero al nia komitato.

Ni deziras informi vin, ke en la kongreso kompreneble estis organizita bone funkcia gazetaro servo, kiu ĉiutage dissendis informojn kaj notojn pri la okazintaĵoj. Specialaj notoj ankaŭ estis faritaj por la telegraficejoj. Estas fakte bedaŭrinde, ke neniu noto aperis ĉe vi, sed ni povas nenion fari por tio, ĉar tio ne dependas de nia influo. Jam du jarojn, unu post la alia, ni rimarkas ke en tuta Aŭstralio kaj Oceanio aperas neniam novaĵo pri niaj kongresoj.

Evidente tio dependas de la agentejo Reuter, resp. de ĝia korespondanto por Aŭstralio. Plej bone estus kompreneble mem sendi kablegramon al Novzelando, sed por tio mankas la necesaj monrimedoj kaj povas okazi, ke eĉ tian kablegramon la tiea gazetaro ne akceptos kaj tiam la elspezo estis vana.

Laŭ ni ekzistas nur unu rimedo, ke vi insistu ĉe la diversaj redakcioj kaj la reprezentantaro de la eŭropaj agentejoj tie, ke ili ne pretervidu nian movadon.

Kopion de tiu-ĉi letero ni sendas al nia prezidanto, kiu samtempe estas prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio.

Eble li povos, pere de B.E.A., influ la aferon por ke estonte vi ne plu havu okazon, esti malkontentaj.

Ni deziras ankoraŭ altiri vian atenton al tio, ke niaj kongresoj ne estas nur kongresoj de U.E.A., sed de la tuta neŭtrala Esperanto-movado; U.E.A. ne plu havas apartajn kongresojn.

Ni multe dankas vin, se en la venonta numero de via organo vi bonvolos fari mallongan noton pri nia zorgo koncerne tiun aferon.

Intertempe ni sendas al vi, tre estimataj, karaj samideanoj, kun koraj bondeziroj por via laboro, niajn plej sincerajn kaj samideanajn salutojn.

Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado

ROB-KREUZ, Generala sekretario.

KURSO PER TRADUKADO.

(Kondukata de S-ro. George Gordon,
F.B.E.A.)

Antaŭaj tradukoj kaj notaroj en ĉi tiu kurso aperis en la numeroj de Junio ĝis Decembro de la Suda Krucio. Studentoj dezirantaj kursani-ĝi devus havigi al si tiujn numerojn, ĉar en estontaj notaroj ofte estos referencoj al klarigoj en ili. Por ricevi estontajn tradukotajn pecojn ili sin turnu al Miss Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, E10, sendante al ŝi po 4 penceoj kaj unu adresita, afrankita koverto por ĉiu peco. Oni povas ricevi tradukotajn pecojn 1 ĝis 9 po 4 penceoj por ĉiu.

TRADUKO 8.

Videtoj al Nova Gvineo
(daŭrigata).

Veturinte (1) kvin tagojn de Brisbane oni saĝe forlasu la liton por rigardi la levigon de la suno, dum la ŝipo, manovrante (1) tra (2) tordecajn pasejojn veturas preter sennombraj insuletoj, vestitaj (10) de la plej bela verdaĵo de la supro ĝis la marbordo. Ie kaj ie (3) estas atesto de terkultivado (4), kaj videblaj inter kokosaj palmoj staras malgrandaj bangaloj (unuetaĝa domo kun verando) (5), pri kiu oni imagas, ke tie estus eble pasigi idilian vivon de kontento.

Nun la ŝipo atingas la unuan vizitatan havenon, Samaraj, kaj oni aligas ĝin al malgranda elŝipejo. Ĉi tiu insuleto, administrata de Papuo, estas vera Edena ĝardeno. Ĝi havas (6) nur kvindek tri akrojn (ĉirkaŭ 2145 arojn), kaj laŭ larĝa vojeto el pistita koralo kaj borderita de palmoj oni povas nerapide ĉirkaŭmarŝi la insulon dum malpli ol duono de horo. Flanke de la vojeto vidiĝas brilkoloraj (7) kaj de hibiskoj (7) borderitaj vojstrektoj, kondukantaj (10) al loĝdomoj, el kiuj iuj, starantaj (10) alte sur la mezo de la insulo, povas rigardi sur belan kaj vastan perspektivon. Preskaŭ ŝajnas malhonoro (8), ke oni faras ordinaran negocon sur tiu mare zonita gemo. Tamen Samaraj servas kiel deponejo de komercaĵoj por la orienta parto de Papuo, kaj ĉe la ĉefa strato staras butikoj, tri hoteloj kaj preĝejo kaj aliloke klubdomo, hospitalo, banko kaj senfadena telegrafa stacio. Poeziema

homo ricevas pluan skuan (9) vidante (1) aron da indiĝenaj punlaboruloj sidantaj (10) sur la grundo (11) kaj tondantaj (10) per longaj tranĉiloj la herbon de herbobedo, dum indiĝena policano kun bastono en la mano tenas sur ili pli-malpli (12) observantan okulon.

Lasinte (1) Samaraj, oni veturas laŭ la suda bordo de New Britain (elp. nju briten), la plej granda insulo en la submandata teritorio Nova Gvineo. La insulo estas longa (6) tricent Anglajn mejlojn (ĉirkaŭ 480 kilometrojn) (13) kaj larĝa sesdek ĝis naŭdek mejlojn (14) kaj havas amplekson de dek-trimil kvadrataj mejloj (ĉirkaŭ 33 kvadratkilometroj). Ĝi estas montabunda kaj estas dense kovrita de arbaregoj krom en la nordorienta parto de la duoninsulo Gazelle kaj aliloke en malgrandaj spacoj, kiujn oni senarbigis (15) por plantejoj aŭ indiĝenaj ĝardenoj. Nur malmulton de la marbordo de New Britain oni detale surkurtigis. Dum sia lastatempa flugo al la Pacifikaj insuloj grup-kapitano Williams raportis, ke li vidis de supre almenaŭ dek du grandajn riverojn, kiuj ne troviĝas sur kiu ajn (16) geografia karto. Grandaj areoj de ĉi tiu kaj aliaj insuloj ne estas esploritaj, kaj preskaŭ nenie en la teritorio ekzistas registara posteno aŭ misiejo proksime malpli ol dek (17) mejlojn (16 kilometrojn) de la oceano. La orienta, norda kaj okcidenta marbordoj de New Britain konsistas el ĉeno de vulkanoj, el kiuj multaj ankoraŭ estas vivaj. Inter la vulkanoj plej ofte estas ebenaĵo, malofte montoĉeno. Mallumiĝas dum ni rigardas la marbordon, kaj baldaŭ sur ĝia malklare videbla konturo je regulaj interspacoj aperas malgrandegaj punktoj de lumo, signantaj (10) la fajron en indiĝenaj vilaĝoj. Antaŭ la mateniĝo oni faligas la ankron en golfeto Blanche.

NOTARO 8.

1. Adverba participo. Notaro 2/10.
— 2. "tra" sekvata de akuzativo havas la signifon "through" (en ĉe unu flanko kaj el ĉe la kontraŭa flanko). Oni uzas "tra" kun nominativo por signifi "through," kiel en la frazo "Mi iradis tra la urbo" (through aŭ about in). Tamen iuj verkistoj uzas la nominativon en ambaŭ sencoj (L.R. pĝ 74). — 3. "ie kaj ie," Zamen Rab. de Bah. 32/15. Troviĝas ankaŭ "tie ĉi kaj tie" (Kabe, Far. ii,

152/17) kaj "tie ĉi tie." — 4. "terkultivi." En Biblio. Gen. 9/20, 2 Reg. 25/12. — 5. "bangalo" ankoraŭ ne estas oficialigita vorto, sed ĝi estas internacie komprenebla. — 6. Oni atente rimarku la diversajn manierojn por esprimi mezurojn. La bastono estas longa je du futoj (aŭ longa du futojn). La longo de la bastono estas du fotoj. La bastono havas la longon de du futoj. La bastono havas du futojn da longo. Tiel same ĉe pezo, areo, volumeno, ktp. — 7. "krotono," "hibisko" (Verax). — 8. "profan" ankoraŭ ne estas oficialigita, kaj pro tio, ke la Angla "profane" havas diversajn signifojn, mi konsilas uzi "malsanktig" aŭ "malhonor" en la ĉi-tiea senco. El. 31/4, Lev. 21/12. — 9. "shock," skuo. Rab. 12/19, 38/25, 124/19. "ŝok" ankoraŭ ne estas oficialigita. — 10. Adjektiva participo. Notaro 1/20. — 11. "ground" (surface of earth); "grundo." Rab. de Bas. 46/47. — 12. "more or less," plimalpli. Rab. 95/21. — 13. Kilometro estas ĉirkaŭ kvin okonojn de Angla mejlo. — 14. En tia esprimo oni uzas akuzativon, ĉar en ĝi "ĝis" ne estas prepozicio sed kvazaŭ parto de nedifinita numeralo sesdek-ĝis-naŭdek, — 15. Anstataŭ "kiuj estis senarbigitaj." Notaro 1/21. — 16. Ekz. 30/8. — 17. Akuzativo, ĉar "ol" ne estas prepozicio.

KRONIKO.

MELBOURNE, Vic. — La plej grava okazaĵo de la monato estis festa vespero por honoro d-ron Zamenhof je la datreveno de lia naskiĝo. Je la invito de s-ro. kaj f-ino Pyke, ĉirkaŭ naŭdek gastoj kunvenis en la "Austral Salon" kaj ĝuis tre aŭdindan programon de kantoj, muziko, kaj teatraĵo. Dum la vespero s-roj. Drummond, J. Skurrie (prez. Melb. Esperanto-Societo) kaj J. G. Pyke (prez. Melb. Esperanto-Klubo) faris taŭgajn paroladojn pri la kara Majstro. Fraŭlineto Shirley Dumbrell deklamis "Asfodeloj" tre naive, kaj s-ino. L. Smith kantis ĉarme "Miaj ŝipoj," "Ombraj Arboj" kantita de s-ro. McKenzie, oni bone akceptis kaj ankaŭ la kantoj de s-ro. Davidson "Mia Fil'" kaj "Vekiĝu" de f-ino. Joan Davidson. Tiam sekvis unuakta komedio, "La Amigilo" en kiu bone ludis la jenaj: Maud Helm, Phyllis Pyke, J. G. Pyke, G. Hussey, kaj R. Rawson. La komedio estas la verko de s-ro. Pyke, kaj estas certe ke la

aŭdantaro tre ĝuis la teatraĵon. Intertempe muzikistaro bone ludis, kaj la ĉeestantoj babiladis gaje. Poste oni servis al la gastoj frandaĵojn, en la feste ornamita ĉambro.

AUCKLAND, Nov-zelando. — Je konveno de la ĉi-tiea societo, okazigita je la 8a de Oktobro, ni plu diskutis la proponon refondigi nacian asocion; kaj decidis malgraŭ manko de monrimedoj provi aranĝi por reprezentado ĉe la sugestiita konferenco en Wellington.

Dum pasinta monato polemiko rulis tra la kolonoj de loka taggazeto, "The Sun": iu skribis al la redaktoro volante ke la Kastila lingvo estu akceptata anstataŭ Esperanto kiel lingvo internacia. S-roj J. A. Hodges kaj C. J. Adcock (ambaŭ estas instruistoj) forte defendis Esperanton.

La sekretario societa ricevis peton de la Junulara Kristana Asocio (Y.W.C.A.) gvidi Esperanto-kurson sub la aŭspicioj de la Asocio. Espereble konvenaj aranĝoj farigos.

S-inoj Watkin kaj Bloodworth, Esperantistaj membroj de la Parnell Lerneja Komitato, sukcesis aranĝi por la diskuto ĉe la okazonta komitata kunveno de la Aucklandaj Publikaj Lernejoj de la jena propono:—"Ke konsiderante la antaŭ-nelongan kreskegon de Esperanto kaj la favoregajn raportojn pri tiu lingvo de la angla profesoro Findlay kaj aliaj edukaj aŭtoritatoj bone konataj, la Aucklanda Eduka Departemento estu instigita konsideri la enkondukon de elementa kurso de Esperanto en la duagradajn lernejojn anstataŭ la franca lingvo." La kunlaboro kaj helpo de pluraj lernejaj komitatoj jam estas petitaj.

La eksterurba klaseto ĉe St. Heliers daŭras funkciadi progresante laŭdinde.

S-ino J. L. King, M.P.S., kiu vojaĝis al Antverpeno por partopreni en la 20a E. Kongreso, revenis al ni je la 10a de Oktobro kaj estis kore bonvenigita de malnovaj geamikoj.

HAMILTON, N.Z. — Dum Septembro lasta fondiĝis tie-ĉi "La Hamiltona Esperanto-Societo" kun ĉirkaŭ dudek da geanoj. Tio okazis post la sukceso-plena konkludo de la dua kurso gvidata sub la aŭspicioj de la Laboristara Eduka Asocio. Tre helpis nian aferon Pastro Paris, Esperantista redaktoro de la gazeto "Methodist Times," kiu anoncas pri la lingvo ĉiusabate.

FEILDING, N.Z. — Tiu malnova amiko de Esperanto, S-ro Rod Ross,

raportas ke li sukcese starigis Esperanto-klason ĉe Awahuri, vilaĝo apud Feilding. Konsistante el ses lernantoj, la klaseto kunvenas regule kaj faras kontentigan progreson sub la kapabla gvidado de S-ro Ross.

WELLINGTON, N.Z. — La klubo loka ĉiumarde kunvenas. Dum monato pasinta okazis, krom la instruado, kelkaj intereso-plenaj paroladoj, speciale menciinde estis tiuj de S-ro Bernstein, kiuj priparolis la temon "Pollando — la naskiglando de Esperanto." Ĉar S-ro Bernstein estas filo de Pollando, li povis provizi detalojn nevideblaj al alialandulo.

Tiuj ĉi kronikeroj estis sendita por la Novembra eldono sed pro bedaŭrinda eraro de la poŝto ne atingis nin ĝis post la Decembro eldono estis jam forsendita. (Red.)

AUCKLAND, Novzelando. — De radio-stacio 1YA (333 m. 500 v), la 27an Novembro S-ro J. Lowe King, M.P.S., parolis dum dekkvin minutoj pri Esperanto. Nia vigle laboranta samideano jam ricevis alian inviton priparoli la temon ankaŭ kanti en la lingvo.

La semajna gazeto, N.Z. Truth publikis tre bonan skizon de la multaj agadoj por Esperanto de S-ro King — nomita de la redaktoro kiel "The Esperanto Queen." Interalie la gazeto rakontis al sia pli ol naŭdek mil da legantoj pri ŝiaj spertoj kaj vojaĝo al Eŭropo. La redaktoro klare montris la praktikan valoron de Esperanto.

Dum Novembro S-ro C. A. Adcock lekcias al studentoj ĉe la Training College, kiuj aŭskultis atente kaj tre simpatie. Post konkludo kelkaj enketis pri lernado, k.t.p. S-ro Adcock ankaŭ intervjuis la sekretario de la Y.M.C.A. pri la starigo de kurso kaj kiel rezulto estas preskaŭ certa ke klaso estos aranĝita en la aŭtuno.

HAMILTON, N.Z. — Nia agema organizanto, S-ro Adcock, del. de U.E.A., veturis al Aucklando dum la pasinta monato por propagandi lekciojn. Lia veturo estis tre sukceso-plena. La 9an Decembro li parolis

al la geknaboj de la Metodista Preĝejo, Hamilton, pri la lingvo.

Nia societo provizis al debatanto ĉe Ohura materialon por diskuto pri la temo "Esperanto en Lernejoj."

S-ro Adcock, kiu laboras vigle por la revivigo de la N.Z. 'a Esperantista Asocio raportas ke la kluboj ĉe Auckland kaj Christchurch, aldona al la nia, estas pretaj por esti reprezentataj en la proponita kunveno ĉe Wellington.

MASTERTON, N.Z. — Post tre sukceso-plena sezono la funkciado de la loka klubo interrompiĝis la 15an de Decembro (datreveno de naskatago de D-ro Z.) por la festa periodo. La nune videblaj signoj ja promesas bone por la venonta jaro.

FEILDING, N.Z. — La Esperanto-kurso gvidita de S-ro Rod Ross finiĝis sed tiom entuziasmaj restas la lernantoj ke ili petis al S-ro Ross restarigu novan dum la estonta vintro.

WELLINGTON, N.Z. — La variaj programoj aranĝitaj ĉe la ĉiumardaj kunvenoj de la ĉi-tiea klubo dum la pasinta monato estis altgradaj kaj edukigaj. La klubprezidanto, S-ro E. C. Jack, liveris pluajn paroladojn en Esperanto pritraktante tiajn temojn kiajn "La Eduka Flanko de Esperanto," "Nia Urbo — Wellington," "La Malpli Peza Flanko de Esperanto," kaj "La Fondito de Tutmonda Literatura," ĉiuj el kiuj estis tre ĝuataj. S-ro Dust, Del. U.E.A., daŭris sian lekiadon pri diversaj partoj de Esperanto-gramatiko kaj S-ro Bertram Potts, F.B.E.A., provizis kelke da tre intereso-plenaj paroladoj, uzante por klarigceloj la nigran tabulon. Per tiuj simplaj kretaj skizoj kaj bone elektita parolmaniero, lernantoj ricevis utilan helpon elstudante kaj praktike la lingvon. S-ro W. L. Edman-son, F.B.E.A., multe aldonis al la ĝuado de la programoj deklamante du verkadojn de Shakespeare — "Hamlet's Soliloquy" kaj "The Seven Ages of Man" — sekvante kun monologo, "How Rubenstein Played the Piano."

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? rezorgas mendojn per poŝto. Memoru facila por via monujo. Li speciale p

la adresun

Specialisto pri Fontanplumoj

Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Ĉiuvespere instruado dum unu horo estis provizita. La kluba sekretario aranĝis por la publikado de raporto pri la kunvenoj en la tagjurnaloj per tiu ĉi metodo akirante por la klubo kaj Esperanto ĝenerale regulan kaj efikan propagandon.

Aranĝoj estas farataj por okazigi en nia urbo, ĉirkaŭ la 26a Januaro, konferencon de delegitoj, kiuj kunvenos por diskuti kaj esplori la proponon restarigi la N.Z. Esp. Asociacion.

Pakaĵo de alte valora literaturo estis ricevita donace, pro kio la klubo kore dankas S-inon A. Chapman-Taylor, unu el la pioniroj de la lingvo en Novzelando, kiu restis dum pli ol dudek jaroj fidela kaj sindona al nia movado. Inter la literaturo troviĝas malnovaj eldonitaĵoj, kiuj provizas al la membraro bonegan legmaterialon.

SYDNEY, N.S.W. — Pro la Krisnaska libertempo, la pasinta monato estis tre mallonga por la Esperantisitoj.

Plej skribinde estis la Zamenhof Vespero, kiam okazis la lastan socialan vesperon de la jaro 1928, kaj samtempe festis la datrevenon de nia majstro, Doktoro Zamenhof. En tiu ĉi okazo, Doktoro Williams parolis iomete pri la vivo de Zamenhof, kaj la kresko de la Esperanto-movado.

Kelkaj laboremuloj ankaŭ ricevis premiojn, kiel dankesprimoj de la societanoj pro bonaj servoj. La ricevintoj de premioj estis, S-ro Pfahl kiu estas entuziasma sekretario de antaŭdek jaroj; F-ino Fairfield, estinta kaskisto; kaj S-ino Ostler, Fino Boosey kaj Murphy, kaj S-ro Murphy, kiu bone laboradis al la bone ŝatataj socialaj vesperoj.

Nur du paroladoj estis liverataj dum la monato, unu de S-ro Torr, titolita "Babilonio," kaj unu de S-ino Fleming, pri "Esperanto en Melbourne."

La agema prezidanto, D-ro Williams, ĵus libertempis ĉe la Bluj Montoj, kaj faris gravan propagandon tie. Unu rezulto estas, la deziro starigi grupon ĉe Blackheath.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Austria Esperantisto, 10; Amerika Esperantisto, 2-3; British Esperantist, 284; Bulgara Esperantisto, 1; Bulteno de E. Pres-Agentejo, 18; Esperanto, 9-10; Germana Esperantisto, 11; Heroldo de Esperanto, 44, 45; Inform-servo de la Internacia Labora Oficejo; Oomoto Internacia, 23; Svenska-Tidningen, La Espero, 8-9.

IGNORANCE OF FOREIGN LANGUAGES.

Kant was first made known to Edinburgh in 1803, not in the German original but through a French translation. John Stuart Mill was able, though with difficulty, to read German, but preferred reading translations, and never learnt to shift for himself in a German railway station. When Carlyle met Louis Blanc "it was the veriest fun to watch their conversation. Carlyle's French was a literal translation of his own untranslatable English, uttered too in his own broad Scotch. Louis Blanc could not at all understand him, but would listen attentively, and then answer very wide of the mark." (Car. Fox). Faraday knew no German, and consequently Robert Mayer's and Helmholtz's investigations were a "sealed book" to him. "How different," said Dean Stanley, "might have been the case of the Church of England if Newman had been able to read German." When a German scholar sent an annotated edition of Macbeth to Dr. Furnivall, the director of the New Shakespeare Society, the Early English Text Society, etc., the latter wrote back to regret that he could not read the notes, but that he saw from the figures that the author had gone into metrical questions. When Zola fled from France during the Dreyfus troubles, he was utterly unable to make himself understood in English. And the same was the case with the Danish poet Herman Bang, who died miserably in America in 1912 unable to make his simplest wants understood by those about him.

Nor is a similar inability unknown among statesmen. It is said that it was injurious to Denmark in her difficult political situation in the middle of the last century, that Madvig (the great Latin scholar) and other ministers spoke French with difficulty and felt shy of talking bad French to the foreign ambassadors. Similar things are reported from the World War. Sir Edward Grey could not speak French, and the French ambassador, Cambon, spoke bad English. None of the French or English generals, with the exception of Lord Kitchener, spoke the other nation's language at all well, and at the Peace Conference

Clemenceau gained an undue ascendancy because he was practically the only one who had complete command of both languages. It requires no unusual amount of wisdom to understand that confidential talks between mighty statesmen of different nationalities on topics of world-wide importance lose a great deal if they have to be carried on by means of interpreters; how much better if the mighty of the earth were able to meet on an equal footing linguistically speaking—but that could only be possible by means of a perfectly neutral language.

It is true that we have translators and interpreters, but good and efficient translators are neither plentiful nor very cheap. I take from Miss Pankhurst's book the bit of information that during 1926 the Geneva staff of the League of Nations included 29 translators and interpreters at salaries amounting to £19,800—besides shorthand writers and typists. And then, the League is only a modest beginning of that vast political organisation of the whole world which has to come in a not too distant future!

In these days of cheap travel, of commercial interchange between all parts of the world, of airplanes and broadcasting, of international science and of world-politics, it seems an urgent need for merchants, technical men, scientists, literary men, politicians, in fact for everybody, to have an easy means of getting into touch with foreigners and of learning more from them than is possible by visiting other countries as tongue-tied tourists. The word "international" was only invented by Jeremy Bentham in 1780—nowadays we have come to the point of needing an international language.

Let me mention here also the recent invention of the speaking film, which is now being brought to rare technical perfection. When Axel Petersen and Arnold Poulsen's "phonofilm" was shown to a small audience in Copenhagen, my thought leapt out to the time when by this means it would be possible to have plays and speeches made visible and audible and comprehensible all over the world—the advantages of cinema and radio combined and made still more useful by means of an Interlanguage.

(Prof. Jespersen: An International Language.)

NOVZELANDA POLITIKA SANGO.

Ĉu Esperanto Profitos?

Antaŭ ol la 14a de Novembro pasinta la Novzelanda Parlamento konsistis el tri ĉefaj partioj, t.e., Reformista, la Laborista kaj la Naciista, kiuj enkalkulis 54, 14, kaj 12 membrojn respektive. Post la gravega voĉdonado tiun daton, la partiaj fortoj staras jene: Reformista 28, Unuigita (novenomita) 32, kaj Laborista 19 membrojn.

Konsiderite de ĉiuj vidpunktoj la nuna politika situacio estas tre intereso-plena; kaj se konsiderite en la intereso de Esperanto, ĝi estas precipe promeso-plena. Rilate al tiu temo, la Reformista partio, de kiu S-ro Coates estas la ĉefulo, malfavoras Esperanton kaj ĉian internacilingvan ideon. Tio ja estis multfoje konfesita publike, parole kaj skribe. La Unuigita partio ankoraŭ ne havis sufiĉon da tempo por montri sian inklinon, sed la partiestro, Sir Joseph Ward, estis patrono de la nun dormanta Novzelanda Asocio Esperantista, kaj estintece favore priparolis la lingvon. La enkonduko de Esperanto en la publikajn lernejojn estis oficiala programero de la Laborista partio dum multaj jaroj.

El la supre-cititaj faktoj komprenigas ke estas tre verŝajne ke depost nun Esperantlingvaj aferoj ricevos en Parlamento pli simpatian konsideron ol antaŭe. Samideanoj tra Novzelando memorante la intereson de la nove elektita ĉefministro Ward en pasintaj jaroj, jam komencis unu la alian demandi pri la rezultato de la antaŭnelonga registarsango. Kvankam la opinioj de la individuaj membroj de la nova (Ward) administracio estas ankoraŭ nesciataj, la fakto restas ke la ties partiestro kun la tria (Laborista) partio favoras la ideon de lingvo internacia, kaj kune la du partioj tenos sufiĉon da forto enkonduki leĝojn, se oni tion dezirus, koncerne la oficialan akcepton kaj rekonon de Esperanto. Neniam antaŭe tiaj bonaj signoj sin montris en Novzelando kaj pro tio, espereble estas ke la laboroj de la N.Z.'aj Esperantistoj estonteco portos fruktdonajn rezultojn. Sen ia dubo la laboro estos multe pli faciligita.

Sekve al la alveno de la nova administracio registara, estas urĝa kaj tuja postulo por forta organizo nacia de samideanoj, kiuj unuigitaj en solida fronto povos meti la celojn de Esperanto aŭtoritate antaŭ Parla-

mento kaj la registraraj departementoj. La tempo por tiu organizstarado sendube nune estas oportuna; kaj la bedaŭro estas ke ni ne estas preparintaj.

Ni esperu ke la tagiĝo kiu donis al Novzelando la novan politikan ordon provos esti doninta al la landa Esperanto-movado prospero-plenan, sanan kaj plifacilan vivon. Voko.

WHO ARE INTERESTED IN ESPERANTO?

In connection with the 40th anniversary of Esperanto it is worth inquiring what kind of people are interested in Esperanto. Among the 1000 persons from 36 countries who took part in the 19th Universala Esperanto Congress in Danzig, there were among others: 5 statesmen, 58 men of science, 110 professors, teachers and schoolmasters, alone a hundred public officials, including a large number of postal and railway servants, 23 advocates and notaries, 33 doctors, 14 ecclesiastics, 22 editors and journalists, 64 commercial men, manufacturers, bankers, etc., and more than 150 students.

—I.E.S.

CHANGE OF ADDRESS.

The Melbourne Esperanto Society has moved to new rooms which are conveniently situated, yet removed from the disturbing noise of city traffic. The members will meet on Jan. 4th in the new rooms, in McEwan House, 343 Lit. Collins St. room No. 7, on the 4th floor.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni kvitancas la ricevon de donacoj kaj abonoj jene:— (la daton post la nomo kaj sumo montras al kiu dato la abono estas pagata). L. Irwin, 4/6, Juni '29.

BOOKS YOU SHOULD READ.

Abismoj (Jean Forge)
Paper Covers 3/3
Aladin . . (Cox) . . Paper . . . 6d.
Aŭstralio, Lando kaj Popolo
Delsudo kaj Laiho 7/6
La Biblio 7/6, 10/6, 15/-, 25/-
(According to paper and binding)

HENRY E. CALWELL (Reg.)

Kuracadas malŝanulojn kun bonegaj rezultatoj per Osteopathy, Chiropractic, Dieto kaj aliaj sendrogaj metodoj.

Donas informon senpage.

11 COLLINS ST., MELBOURNE.

Tel.: Cent. 4018.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; **sekretario** f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: McEwan House, 343 Lit. Collins St., Room No. 7, 4th floor. Vendrede vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road. Burwood.

Brisbana Esperanto - Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 3-a etaĝo, King House, Queen-str.: Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose MacPherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Queensland).

WELLINGTON ESPE R A N T O CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

Dancu Marionetoj (Baghy) 2/9
La Faraono (Prus), in 3 Parts
Paper Covers 7/6 set.
Lilio . (Sinnotte) . Cloth 2/9
Luno de Izraelo (H. Rider Haggard)
Paper Covers 5/6.
Postage Extra.

**LA BIBLIOTEKISTO, Melbourne Esperanto Society,
BOX 731 F., ELIZABETH ST. POST OFFICE, MELBOURNE.**